

Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGEBLAS ĈIUTAGE

Numero 86, Aŭgusto 2025



La Granda havenkanalo en Gotenburgo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2
Pri Ora Ĵurnalo.....	2
Espeporko meditas.....	3
Aŭskultu videon pri TEJO kaj pri ties kongresoj.....	3
Esperanto-ekskurso al la somerdomo de Roger Nilsson en Vegby.....	4
La poemo "La eta rivereto" de Allan Edwall.....	6
Kvin rebusoj.....	7
Naciaj kostumoj fariĝas iomete pli interesaj ol dum la pasintaj jardekoj, laŭ programo en la sveda radio.....	8
Malfrusomeraj hajkoj.....	8

Ramlösa Brunnspark – protektita historia loko, <i>Ann-Louise Åkerlund</i>	9
Ramlösa.....	14
La 26a de julio 1887 – la naskiĝtago de Esperanto.....	21
Iom da por rideti ..., <i>Josef Kříž</i>	22
Somero en urbo – kion fari?.....	23
Ĉu esperanto inte ett fullt fungerande språk?, <i>Mikael Parkvall</i>	24
Religioj kaj meditadoj, kiuj uzas Esperanton.....	25
TRO, A. Ĉeĥov.....	27
En julidag i Jönköping, <i>Jan Hellström</i>	30



Legu pri la parko Ramlösa en p. 9 kaj 14.

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝarango: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

Ora Ĵurnalo n-ro 86 ankaŭ troviĝas en versio por la poŝtelefono ĉe

www.esperanto-gbg.org/86



Espeporko meditas



- ♦ Aŭgusto – finfine venis kun iomete pli malvarmetaj ventoj.
- ♦ Eventoj: En junio Sankta Johano kunportis tradician feston, la somermezfeston.
- ♦ Fine de junio ni ekskursis al la somerdomo de Roger. Espereble ĝi fariĝos tradicio!
- ♦ En julio Ann-Louise invitis nin al promeno en Ramlösa Brunn (la bildo) kune kun skanianoj kaj danoj. Bonega iniciato!
- ♦ Rido, aŭ rideto, estas bona por la sano. Josef Kříž sendis aron da amuzaj rakontoj al ni. Dankon!
- ♦ Svedio ja eksportas muzikaĵojn, sed plejparte kun anglaj tekstoj. *La eta rivereto* de Allan Edwall, kies svedaj tekstoj rakontas pri vivo ekde la lulilo ĝis la tombo tamen nur atingas svedojn. *Inga Johansson* per helpo de Google Translate tradukis la tekstojn. Ĝuu la vojon kiun la rivereto elektis.
- ♦ La stokholma lingvisto Mikael Parkvall diskutas la miton, ke Esperanto estus lingvo, malkapabla esprimi ĉion same bone kiel etnaj lingvoj (nur sveda teksto).
- ♦ Kiuj, krom esperanto-societoj kaj kluboj, uzas Esperanton? Eltrovu!
- ♦ Ĝis septembro! /Siv

Aŭskultu videon pri TEJO kaj pri ties kongresoj

Pasintan jaron la kongreso okazis en Litovio, ĉi-jare en Cisarua en Indonezio.



Esperanto estas juna, diras **Josef Kříž**, kaj sendis al ni ligilon al la filmo:

<https://www.youtube.com/watch?v=YFXgQhVLQTE>

Esperanto-ekskurso al la somerdomo de Roger Nilsson en Vegby

Ingegerd fotis, Siv skribis.



Jen Roger bonvenigas nin.

Sabate la 28a de junio membroj de la Esperanto-Societo de Gotenburgo direktis siajn aŭtojn al la regiono de Ulricehamn. Ĉe la strando de la lago Sämsjön situas la somerdomo de Roger.



Jan Bondesson kun la gastiganto Roger.



*Lasse Granat kun siaj familianoj alvenas.
En la fono – la lago Sämsjön.*

La vetero ne estis tiel favora kiel lastjare, kiam ni ankaŭ vizitis lin. Pluvigis kaj pluvegis. Tamen li havas vastan verandon, kunvena por lunĉo, kafumo kaj ludoj.

Kelkaj havis longan vojon kaj ni ne alvenis samtempe.



Dum la lunĉo ni parolis svede. Poste Lasse Granat Esperante laŭtlegis la artikolon pri *La ombrelo* el pli frua Ora Ĵurnalo.

Neniu renkonto sen Esperanto-laŭtleĝo, diras Ingegerd.



La dua ludo temis pri koncentriĝo – oni sufiĉe rapide devas elparoli vortojn de koloroj – sed nur pri la koloro de la literoj, ne pri la signifoj de la vortoj. Oni devis koncentri sin. Provu mem:

Verda, blua, bruna, ruĝa, violkolora, oranĝa, flava, griza, blanka.



Alia ludo: Ĉiu – krom la rolulo – scias kiu li/ŝi estas. La rolulo ricevas paperpecon sur la dorson kun nomo: ekz. Ursula von der Leyen. La papo Leo XIV, Pipi Ŝtrumpolonga, Mats Knutsson k.t.p. La rolulo demandas la aliajn – en Esperanto, kompreneble – *Ĉu mi loĝas en Svedio? Ĉu mi estas juna? Ĉu mi ofte estas vidata televide? Ĉu mi estas kantisto? Ĉu mi estas politikisto ...* k.t.p.



Kiam ne pluvadis, ni povis ekstere trovi poentopromenon farita de Andreas. Multaj diversaj temoj troviĝis: – Pri la islanda prezidento, pri mineraloj, pri lando, kies konturon ni vidis, pri bestoj kun feloj k.t.p. Jen Andreas, ridetante al niaj klopodoj trovi la ĝustan respondon.

Neniu ricevis 13 poentojn. Janne gajnis per siaj 10 poentoj.



Post iom da ekzerco, Christin lerte trafis la tabulan dek-on per sagarkon.





Post iom da tempo venis geamikoj de Roger (maldekstre), Knut kaj Inga. Ili ne sciis multon pri Esperanto. Do, ni havis eblecon klarigi. Anita (sube) ankaŭ rigardis sin komencanto – aŭ komencinto. Kune kun Magnus ŝi do vastigis sian vorttrezoron.



Dankon, Roger, pro via iniciato! /Siv

La poemo "La eta rivereto" de Allan Edwall

La poemo "La Eta Rivereto" de Allan Edwall priskribas la trairon de la vivo, de infanaĝo ĝis maljuneco, kaj kiel malgranda rivereto, reprezentanta simplecon kaj purecon, fluas en la grandan oceanon, same kiel vivo transiras al morto. La poemo esploras temojn kiel memoroj, ŝanĝo, maljuniĝo kaj la senhalta vivofluo.

Dikten "Den lilla bäcken" av Allan Edwall beskriver livets gång, från barndom till ålderdom, och hur en liten bäck, som representerar det enkla och rena, rinner ut i det stora havet, liksom livet övergår i döden. Dikten utforskar temen som minnen, förändring, åldrande och livets obönhörliga gång.



Inga Johansson tradukis "La rivereton" de Allan Edwall per helpo de Google Translate.

Allan Edwall (1924–1997) estis populara kaj amata aktoro, verkisto, poeto kaj pedagogo de la ŝtata sceneja lernejo.

<https://www.youtube.com/watch?v=IphpPrT2xwU>

<https://lyricstranslate.com/sv/allan-edwall-den-lilla-b%C3%A4cken-lyrics.html>



Bildo: Pixabay.

Allan Edwall.

La eta rivereto

Mi estis infano kun klaraj dolĉaj sentoj
kaj sur mian estaĵon la suno brilis
Mia vivo estis nova kaj ankoraŭ sen memoroj
kaj tra la nokto la luno kviete glitis

Kaj mi estis juna kun firmaj paŝoj sur la tero
Mi vivis libere inter arboj kaj sovaĝaj bestoj
Kaj kiel en argilo mi formis la vortojn

Den lilla bäcken

Jag var ett barn med klara ljuva sinnen
och på mitt väsen solen lyste ned
Mitt liv var nytt och ännu utan minnen
och genom natten månen stilla gled

Och jag var ung med fasta steg på jorden
jag levde fritt bland träd och vilda djur
Och som i lera formade jag orden

Kaj pura estis la koro el kiu ili venis

Kaj la rivereto fluas al la rivero
kaj la rivero fluas al la granda maro
kaj neniam plu vi trovos
kie la rivereto malaperis

Kaj mi fariĝis viro kun ĉapelo kaj pezaj botoj
Mi lernis la bridojn de dececo kaj kutimo
Kaj lernis rideti, kiam la tero ŝajnis ŝanceliĝi
sub la pezo de malamikoj, kiuj nin faligas

Mi rigardas la mondon tra la okuloj de la
mortintoj
per la zorgoj de aliaj mi aĉetas mian pacon
kaj mi frapas malsupren dum mi lekas supren
kaj ronkas kun la aflikto de la animo apud mi

Kaj la rivereto fluas al la rivero
kaj la rivero fluas al la granda maro
kaj neniam plu vi trovos
kie la rivereto malaperis

Mi kolektas tempon kiel muso kolektas
manĝorestaĵojn
Mi kolektas jarojn por la konstruado de vivo
Ĉar ĉio granda kaj forta estas konstruita el eroj
Kaj la vero de bedaŭrinda mensogo konsistas

En mia buŝo mi sentas la vortojn sonorantajn
kiel eĥoj de ĉio, kio jam estis dirita
Mia fido estas malforta kaj mia saĝo estas
malgranda
ĉio estas komenco, mezo kaj fino

Kaj la rivereto fluas al la rivero
kaj la rivero fluas al la granda maro
kaj neniam plu vi trovos
kie la rivereto malaperis

Fonto: LyricFind

och rent var hjärtat som de kommo ur

Och lilla bäcken mot älven rinner
och älven rinner mot stora hav
och aldrig någonsin mer du finner
var lilla bäcken blev av

Och jag blev man med hatt och stövlar tunga
Jag lärde tyglarna av lämplighet och sed
Och lärde le, när marken tycktes gunga
av tyngd från fiender som högg oss ned

Jag ser på världen genom dödas blickar
med andras oro köper jag min frid
Och nedåt slår jag när jag uppåt slickar
och snarkar däst med själens nöd bredvid

Och lilla bäcken mot älven rinner
och älven rinner mot stora hav
och aldrig någonsin mer du finner
var lilla bäcken blev av

Jag samlar tid som musen samlar skulor
till livets byggnad samlar jag på år
För allting stort och starkt är byggt av smulor
och sanningen av ångrad lögn består


I munnens valv jag känner orden klinga
som återskalv av allt som sagts förut
Min tro är klen och klokenskapen ringa
och allt är början, mitt-opp-i och slut

Och lilla bäcken mot älven rinner
och älven rinner mot stora hav
Och aldrig någonsin mer du finner
var lilla bäcken blev av

Källa: LyricFind

Kvin rebusoj

Du facilaj, tri malfacilaj. Solvo en la lasta paĝo.



ktoro, verk



Naciaj kostumoj fariĝas iomete pli interesaj ol dum la pasintaj jardekoj, laŭ programo en la sveda radio

Dum multaj jaroj svedaj gejunuloj ne interesiĝis pri folkloraj kostumoj kaj la popoldancgrupoj pli kaj pli maljuniĝis. Eble estos ŝanĝo.



Alveninte al Gräfsnäs en la vespero de Sankta Johano ni, Ritva kaj mi, trifoje estis pridemanditaj pri la deveno de niaj kostumoj. La kostumo de Ritva devenas de **Norda Botnio**, la plej norda parto de Svedio. Ŝia antaŭtuko kaj ŝalo estas hejme teksitaj. Neniu el ni portas niajn kufojn. Mia iama gvidanto de la popoldanc-societo de Stora Lundby, plendus, se li vidus nin sen kufoj. Mia kostumo estas sufiĉe konata ĉe la okcidenta marbordo kiel la **Tjörn-kostumo**, la plej suda el la kvin bohuslandaj kostumoj.

Plej maldekstre vi vidas la plej nordan el la kvin Bohus-kostumoj, la **Inlandan**. La antaŭtukoj ne estas hejme teksitaj, sed

aĉetitaj. La komerco kun aliaj landoj ja floradis.

Plej dekstre sidas virino en la **Sveda nacia kostumo**, kies apero estas pli nova ol la aliaj. Ĝi ne estas ligita al iu provinco. I.a. reĝa familianoj portas tiajn.

La **viraj kostumoj** ne estas tiel variaj. Ekz. troviĝas nur unu bohus-kostumo por viroj, sed kvin por virinoj. /Siv



Malfrusomeraj hajkoj

Ŝtonoj kaj arboj
rigardegas freneze al mi
en la varmeĝo

Kyorai



Mi faras geston
forbalai la araneaĵon
sed restas ĉe la intenco

Issa

Ramlösa Brunnspark – protektita historia loko

de Ann-Louise Åkerlund

Ĉe la fino de la 1600-aj jaroj, Johan Jacob Döbelius malkovris, ke akvo de la fero-fonto en Ramlösa havis sanigajn efikojn sur la soldatoj de Karl XII. Li estis tiel impresita de la efiko de la akvo, ke li proklamis la lokon akvokuracejo, kiu estis inaŭgurita la 17-an de junio 1707. Poste fariĝis tre populara trinki fontakvon, kaj Johan Jacob Döbelius ordonis glason da akvo je malplena stomako kontraŭ multaj malsanoj. La saniga fonto baldaŭ evoluis en unu el la pli konataj en la lando.



Ĉe la fino de la 1800-aj jaroj, hazarde malkovriĝis alia fonto, la fonto kun alkala akvo. La akvo montriĝis esti riĉa je mineraloj kaj saloj. Karbondioksido estis aldonita, kaj tiel ni ricevis Ramlösa mineralakvon.

En la parko estas kaj privatloĝejoj kaj aktivecoj, kio tenas ĝin viva dum la tuta jaro. La tuta areo estis deklarita kiel savinda memoraĵo en 1973 kaj estas unika fontana medio kun konstruaĵoj, pejzaĝa ĝardeno, plantejoj, fontoj, kanjono kun arbarĝardeno kaj promenadaj vojetoj. Oni ne rajtas malkonstrui domojn aŭ ŝanĝi la eksterajn partojn de la domoj. Oni ankaŭ ne rajtas konstrui pliajn domojn en la parko aŭ draste ŝanĝi la verdajn terenojn tie. Tamen, dum la jaroj 2023–2025 la parko estis renovigita por ricevi iom pli origina aŭ aŭtenta aspekto.

Profunde sube en Ramlösa ravino vi povas sekvi la kurban vojeton de Lusseback tra la arbaro. Ĉi tie kreskas malnovaj fagoj sed ankaŭ oleandroj, tilioj kaj aliaj arboj. La ravino estis dum la 17-a jarcento paŝtejo, kiu apartenis al la bienuloj de Ramlösa.

Unu el la du fontoj de la ravino gutas tra la ŝtonfundamento. Sur la altaĵoj supre vi povas

ĝui la allogaĵojn de la parko, promenoj, lignaj domoj de la glora epoko de la kuracejo kaj la plej granda ligna konstruaĵo de Svedio, Brunnshotellet. La loko havas ekscitan historion kiel restadejo por banditoj kaj soldatoj, fontdrinkantaj nobeloj kaj rifuĝintoj de la Dua Mondmilito.

La areo de la parko montras ĝardenajn stilojn el diversaj epokoj, sed plej multe dominas la angla romantika pejzaĝogardeno. La parko estas dividita en partojn kie la arbaro kreskas libere, kaj kulturoĝardeno kie troviĝas pluraj vilaoj. En la arbara parto kreskas fagoj, kverkoj, fraksenoj kaj avelujoj. La kulturoĝardeno konsistas el grandaj herbejoj kun imponaj arboj kaj aleoj de ekzemple kaŝtano kaj tilio. Estas ankaŭ multaj nekutimaj arboj en la ĝardeno, ekzemple tuliparbo, vera kaŝtano, kaŭkaza nukso, ĉina sekvojo, turka avelujo, hungara kverko kaj magnolio.

La ĉefa akso tra la parko estis origine plantita per tilioj – sed nuntempe estas ĉevalkaŝtanoj, kiuj troviĝas la plej ofte en la avenuo, kaj ankaŭ aceroj. En la 18-a jarcento troviĝis avenuo da poploj, kiu

kondukis al la fera fonto. La ĉefa akso, la transversaj aksoj kaj ankaŭ la arboavenuoj originas el ĝardena arkitekturo de la baroka epoko.

La Ramlösa akvokuracejo plurfoje estis loko por akcepto de rifuĝantoj. En la aŭtuno de 1943 la ĝardeno fariĝis unu el pluraj kolektejoj/tendaroj por miloj da danaj judoj,

kiuj fuĝis trans Öresund. En printempo de 1945 la loko funkciis kiel norda centro por la akcepto de pluraj miloj da koncentrejoj kaptitoj, kiuj estis liberigitaj per la helpa operacio de la Ruĝa Kruco 'La blankaj busoj'. En la aŭtuno de 1956 Ramlösa akvokuracejo estis portempa restadejo por hungaraj rifuĝantoj post la hungara revolucio.

La hotelo

La konstruaĵo estis starigita en 1879 kaj pligrandigita en 1907. Grava parto de la tiel nomata societa vivo okazis tie. La restoracio estis fame konata, kaj por sia bongusta manĝaĵo kaj por siaj belaj mondumaj salonegoj. Ankaŭ malgranda hotelo troviĝis en la konstruaĵo. La hotelo estis radikale restaŭrita en 1991 kaj enhavas nuntempe oficejojn kaj infanvartejon.



La granda urno

La urno estas desegnita de la artisto Ferdinand Ring kaj fabrikita ĉirkaŭ 1860 de la ŝtonuja fabriko de Höganäs. Post kiam ĝi estis montrita dum la Stokholma ekspozicio en 1866, la kompanio donacis ĝin al la akvokuracejo de Ramlösa. En la nuna loko ĝi staras ekde la kvindekaj jaroj.

La varmbaneja domo

Konstruita en la jaro 1880 kaj pligrandigita en 1919 ĝi fariĝis banejo eksterordinara, kiu ofertis multajn diversajn specojn de banoj. Dum la plej glora epoko de la akvokuracejo oni ofertis banojn en varma kaj malvarma akvo, ŝlimbanojn, masaĝojn, kuracojn en vaporŝrankoj ktp.



Villa Desideria

Ĝi konstruiĝis en 1801 kaj estas la plej malnova el la vilaoj en la parko. La nomon Desideria ĝi ricevis de la reĝino Desideria (Desirée, edzino de reĝo Karl XIV Johan), kiu loĝis en tiu ĉi domo kiam ŝi vizitis la akvokuracejon. Aliajn vilaojn, kun la nomoj Linnea, Viola, Veronica kaj Pyrola, la skania nobelaro konstruigis kiel somerdometojn.



La biletgiĉeta budo

Inter 1877 kaj 1890 ekzistis privata ĉevala tramvojo de Ramlösa akvokuracejo al la marbordo, kie situis banhejmo apartenata de la akvokuraceja kompanio. La itinero estis preskaŭ tri kilometroj, kaj la veturo daŭris dek du minutojn. En 1891, estis inaŭgurita la mal-larĝtraka fervojo Helsingborg-Råå-Ramlösa kun flanko trako al la akvokuracejo. Entreprenisto de Helsingborg aĉetis trakojn, vaporlokomotivon kaj du vagonojn post la monda ekspozicio en Parizo kaj pro tio ĝi estas konata kiel "La Decauville".

"Malantaŭ la ondoj"

skulptaĵo de Ulla kaj Gustav Kraitz.

La skulptaĵo *Malantaŭ la ondoj* estas memorŝtono pri la akcepto de rifuĝantoj en Skåne. Ĝi estis desegnita de Gustav kaj Ulla Kraitz kaj inaŭgurita de HSHK Kronprincino Victoria kaj HSHK Kronprincino Haakon de Norvegio en aŭgusto 2010. Ĉirkaŭ la skulptaĵo troviĝas areo el grandaj bazaltaj ŝtonoj, kiuj venas el la geto en Budapeŝto.



Oficejaj domoj

La malnova akvokuraceja oficejo, ankaŭ nomita ĉefkontista domo, de 1929. La nova oficeja domo konstruita en 1938 en malnova stilo.



La muzika pavilono.

La kuracista vilao

Konstruita ĉirkaŭ la jaro 1800, unue kiel gastejo kaj post kiel loĝejo por la ĉefkuracisto. Dum la jaroj multaj eminentaj kuracistoj kaj profesoroj pri medicino laboris en Ramlösa dum la somero.



La malsanulejo

Konstruita en 1836. Komence la konstruaĵo nomiĝis "Ramlösa Vivtena Institutio por Malriĉuloj" (Ramlösa Fattigförsörjningsanstalt). Reĝo Karl XIV Johan finance subtenis la projekton.



La Arkado

Komence banejo por varmaj banoj kaj diversaj kuracmetodoj. Malantaŭ la nuna konstruaĵo estis loko por vintroĝardeno kaj nombro de banĉambroj kaj ĉambroj por diversaj kuracadoj. 1939 tiuj ĉambroj estis ŝanĝitaj al lavejo kaj poste en 1979 malkonstruitaj.



La fera fonto

En la kavo ĉe la Arkado la bonfara fera akvo elsorbiĝas de la sabloŝtona rokplato. Restado en Ramlösa iam signifis ke la pacientoj trinkis grandajn kvantojn de tiu ĉi akvo, ĝis ok litroj tage. La akvo de la fera fonto entenas 0,0190 miligramojn da fera karbonato en unu

litro da akvo. En malnovaj tempoj oni opiniis, ke la akvo povis kuraci malsanojn kiel reŭmatismen, renan gruzon, iskiatikon, kordifektojn, larmantajn ruĝajn okulojn, malbonan spiradon kaj anemion.



La alkala fonto

La akvo de Ramlösa en la nunaj tagoj estas bongusta alkala akvo. Ĝi malkovriĝis je la fino de la 19-a jarcento per vera hazardo. Oni serĉis salan akvon, kaj pro tio la elreviĝo estis granda ĝis kiam oni komprenis ke oni trovis unikan mineralan akvon kaj bonan entreprenan ideon. Fabriko estis starigita en la ravino, kie la akvo de Ramlösa enboteliĝis.

En 1973 nova fabriko konstruiĝis en la industria kvartalo de Ättekulla, kien la akvo nun estas transportata tra senrusta kunduktubo. La antikva fabriko en la parko malkonstruiĝis. La fonto estis renovigita en 1995.



La runŝtono de Hårleman

Unu el la arkitektoj, envolvitaj en la konstruado de la palaco de Stokholmo, Carl Hårleman, starigis la runŝtonon kiel dankan memoron de la virto de la akvo de Ramlösa. Carl Hårleman ankaŭ aktive laboris por plibeligi la parkon.



La filozofia vojeto

estas la nomo de la piedvojeto, kiu gvidas en la arbaran parton de la parko. Ĉi tie multaj gastoj de la akvokuracejo promenadis. Se vi zorge studas la trunkojn de la arboj, vi trovos nomojn enĉizitaj en la ŝelo. De la arbara parko la vojeto supreniras al la altebenaĵo kaj al la romantika parto de la parko de Ramlösa.

Ramlösa

19/7 jaro 2025

— somera aventuro, kiun kelkaj entuziasmoj akceptis!

Sed ĝi komenciĝis tiel, Andreas frue sendas Rapidan Informilon, specon de ilo, kiun la Gotenburga klubo uzas por sciigi membrojn, ke "io okazos"!

Poste estas atendo, ĉu iu ajn akceptos ĉi tiun aferon pri parko de Ramlösa? Kaj efektive, Roger preskaŭ tuj telefonas kaj volas iri kune!

Mi demandas ĉu li, kiu estas tre bona ŝoforo, povus stiri, kaj li povis!



Fine, ni ses, kiuj foriris. Mia familio kaj mi estas kalkulitaj kiel tri homoj, Lasse, Christin kaj Ingegerd. Krome venis Zakia, kiu estas bona esperantisto el Hjällbo kaj uzas okazon por vidi "Svedion". Eva, la instruistino, kiu



foje kaptas la okazon, kaj poste la entuziasma Roger, kiu kondukas la buson. Lasse estas kunŝoforo kaj ambaŭ estas registritaj ŝoforoj ĉe la lu-firmao.



Eva.

Ĉe la parkejo en Ramlösa, entuziasma Ann-Louise staras kaj mansvingas nin enen. Ŝi kondukas nin al "granda ŝtuparo", kie ŝi intencas komenci la prezentadon de la Parko.



Ann-Louise.

Kompreneble, ŝi parolas en Esperanto, kaj paperoj estas disdonitaj por ke la publiko povu sekvi. Grandan dankon pro la engaĝiĝo al Esperanto, kiun vi, Ann-Louise, montris ĉi-okaze. Ni ĉiuj tre ĝuis ĝin!

Ili venas el oriento kaj okcidento, sudo kaj nordo, oni povus diri. Feliĉaj kaj pozitivaj parolantoj de Esperanto. Ĉiam amuze estas renkonti samideanojn el aliaj lokoj.

La malnova hotelo havas tre ekscitan arkitekturon. Estas vere ĝue stari kaj rigardi ĉiujn angulojn kaj loketojn, imagante **la vivon**



ĉe la puto kia ĝi estis tiam, en la tempo kiam "trinki de puto" estis kutima kaj ankaŭ la kuraco al ĉiaj malsanoj.



Malsupre de la hotelo estis scenejo kun grandega akustiko. Ni scias tion ĉar la kantistino Eva el Gotenburgo volis provi tion kaj mi, starante malproksime, aŭdis fortan sonon. Zakia aliĝis kaj aldonis kelkajn arabajn melodiojn al la sonfluo.



Antaŭ la hotelo estas lago, kiu enhavas multajn ekscitajn aferojn. Eble vi povas vidi ranon se vi klopodos. Alie, vi povas kontentiĝi pri la surfaco se vi ne havas iujn ajn revojn pri propra amfibiejo.





Zakia el Hjällbo tuj serĉas florbedon, poste rapidas kun sia poŝtelefono kaj notlibro kaj prenas notojn.



Sur la buso ŝi parolas pri sia patrino, kiu foje vizitas ŝin kaj ĉiam trinkas "*amlösa*" kun ŝia manĝaĵo.

Ŝi nun estas en "Svedio".



La urno, granda kaj ornamita, estas metita apud la lageto.

Mi scivolas, kion ĝi povus enhavi, eble ĉiujn grandajn orajn riĉaĵojn de la mondo, aŭ brandon kiel en "Kopparmärra" en Gotenburgo, aŭ ĉu ĝi estas tute malplena kaj senenhava?

La varmbanujo bruligas sin en la forta somera suno. Imagu la orgiojn de ŝlimbanantoj kaj vaporantaj vaporŝrankbanantoj, kiuj iam metis sian esperon e ĉi tiujn metodojn. Mi preskaŭ povas aŭdi la konversaciojn inter pacientoj kaj kuracistoj, paciento kaj kunpaciento en la milda susuro de la arboj en la vento.






Ripozado inter la floroj povas esti agrabla post ĉiuj traktadoj en la Varmbanujo.

Nun ni atingis la idiliajn domojn, kiuj kuŝas en la ombro malantaŭ altaj heĝoj. Ŝajnas, ke ekzistas klaraj similecoj kun la televida serio "Midsomer Murders". Kiuj noktnigraj



abomenaĵoj estis faritaj ĉi tie sub la lunlumo, aŭ ne...

La arboj estas mirindaj! Kelkaj el ili estis provizitaj per ovalaj ŝildoj najlitaj al la trunkoj. Ili estas aparte rimarkindaj kaj multaj tre specialaj arboj disvastigis siajn foliojn por ni hodiaŭ.





La grupo, kiu kunvenis en Ramlösa, konsistis el homoj el Eslöv, Helsingborg, Malmö, Kopenhago kaj Gotenburgo, kaj ni ĉiuj verŝajne sentis sudsvedan etoson furiozantan ĉirkaŭ ni, dum ni promenis kaj ĝuis la sunon.

Tagmeze, la kafejo ofertas kaj salikokajn sandviĉojn, tomatan torton, kokidan salaton,

kukojn kaj aliajn bakaĵojn...

La kafejo situas apud ĉi tiu mirinda konstruaĵo, kiu prezentas bildojn el la pasinteco sub tegmento. Estas agrable iri en la ombron kaj rigardi ilin.





Jen fonto fluas! La akvo aspektas rusta kaj mi ne kuraĝus gustumi ĝin. Sed ĉiu estas benita per sia fido. Almenaŭ en tiuj tagoj ili havis fidon.



Jen estos la lasta haltejo. Ĝi estas alkala fonto. Sed ĉi tie ni lernas, ke ne la akvon ni devus timi, sed anstataŭe atenti sovaĝan adoleskanton, kiu pafas kiel kuglo per elektra



skutilo rekte al ni... sen kasko sur la kapo, sen prudento en la kapo, nur ĵetante sin flanken... kiel finiĝos ĉi tiu vojaĝo?



Ni kunvenas antaŭ nia foriro hejmen, dankante unu la alian pro amuza kaj ĝuebla tago sub la suno de Skanio kune kun tiuj, kiuj fariĝis niaj esperantaj amikoj tiun tagon.



Roger kaj Zakia staras en la ombro atendante la veturon hejmen.



La 26a de julio 1887 – la naskiĝtago de Esperanto

Ĉi-jare ni ne aparte festis tiun tagon en Gotenburgo, sed la naskiĝtagon de L.L. Zamenhof la 15an de decembro, ni ja ĉiam festas.



Pensoj inspiritaj de artikolo el 2012 de Linus Ganman pri lingvoj en Internet:

Lingvoj mortas kaj oni povas ligi la lingvomorton al la morto de la lasta parolinto. Tio oftas. Pli malofte oni povas datigi la naskiĝon de nova lingvo.

Esperanto naskiĝis la 26-an de julio en 1887 – pri tiu apenaŭ estas diskuto. La unua lernolibro pri Esperanto aperis tiun daton.

Hodiaŭ preskaŭ ĉiu parolas la anglan – pli, malpli bone. Ĉu Esperanto estas mortanta? Tute ne. Eĉ se Esperanto estas malgranda lingvo, ĝi fakte estas geografie tre disvastigita. Malfacile diri kiom da esperantoparolantaj homoj troviĝas. Oni taksas ĉirkaŭ 2 milionoj – sed neniuj scias.

Kiuj do parolas Esperanton? Fakte sufiĉe multaj el ili havas la anglan kiel gepatran lingvon, aŭ laborlingvon. *Duolingo* donas Esperantokursojn al anglo-parolantoj. Per

Duolingo junuloj ofte havas la unuan kontakton kun esperantokurso kaj foje post iu tempo kontaktas Esperanto-klubon por provi sian lertecon.

Kelkaj estas inspiritaj de la ideo pri komprenado inter la popoloj. Aliaj interesiĝas pri lingvoj kaj ŝatas la genian konstruon de Esperanto, aparte la literumon kun neniam superflua literoj. Krome la gramatiko estas brile konstruita. Aliaj eble volas sperti la etoson de aliaj landoj kun aliaj kutimoj kaj uzi la eblecon donitan de Pasporta Servo. Facile oni per *Pasporta Servo* trovas esperantistojn en ĉirkaŭ 70 landoj, kiuj senkoste ofertas tranokton kaj gvidadon en iliaj urboj. Denaskaj angloparolantoj povas eviti situaciojn, kie la angla estas internacia pontolingvo kaj kie denaskaj angloparolantoj havas grandajn avantaĝojn – sed ili certe ne multas. Zamenhof kreis lingvon – *ĉies dua*

lingvo, kiu ne partoprenas al iu lando. Do, egaleco!

Dum la vivotempo de Zamenhof, la angla ankoraŭ ne ludis la rolon de mondlingvo. La latino havis grandan geografian disvastiĝon, sed ĝi estis tro komplika por ĉies ĉiutaga uzo. La iniciato de Zamenhof estis bonvena kaj la komenco estis prospera.

Post la dua mondmilito la rolo de Esperanto malgrandiĝis. Ĝi ne mortis!!! Tute ne! Ĝi tre bone vivas – sed en la ombro de la angla. Tamen ĉiun jaron originaj kaj tradukitaj libroj kaj multaj revuoj aperas en Esperanto. Ni atendu novan esperanto-ondon kaj dumtempe ni plibonigu nian lertecon, ĉu ne?!
/ *Siv Burell*

Iom da por rideti ...

preparis: **Josef Kříž**, Ĉeĥio

S-ro Johanson revenas hejmen post noktomezo kaj lia kolera edzino jam atendas lin ĉe la pordo.

– Silentu, mia kara, ŝia edzo trankviligas ŝin. Mi malkovris ion mirindan kaj mi diros al vi kio ĝi estas matene!

Do la surprizita edzino iras dormi, sed la sekvan matenon ŝi demandas sian edzon:

– Do kion vi malkovris hieraŭ?

– Novan drinkejon!

”Do, Vaĉjo, montru al ni sur la mapo, kie estas la Nigra kaj Ruĝa Maro,” diras instruisto.

”Mi dubas, ke tio eblas,” respondas Vaĉjo.

”Kaj kial ne?” demandas la instruisto.

Vaĉjo: ”Ĉar estas nur bluaj maroj sur tiu ĉi mapo.”

En lerneja klasĉambro dum zoologio:

Instruisto: ”Vi, Peĉjo, diru al mi: Kiom longe vivas muso?”

Peĉjo: ”Mi ne scias precize, dependas de la malsata kato.”

”Sinjoro, via filo ĵetis ŝtonon al mia aŭto!”

”Kaj li trafis ĝin?”

”Danke ne!”

”Do, li certe ne estis mia filo.”

Konstato:

Se vi nun pezas cent kilogramojn, vi pezus nur tridek ok sur Marso.

Do, vi fakte ne estas dika, vi estas nur sur la malĝusta planedo!

Nigra humuro:

”Oni diras, ke kiam oni vidas urson, oni nur devas kuri rapide.”

”Ne, ne, oni nur devas kuri pli rapide ol la plej malrapida persono el la grupo da turistoj.”

”De kie vi akiris tiun novan poŝtelefonon?”

”Mi gajnis kuradan konkurson.”

”Kaj kiuj ĉiuj kuris?”

”La posedanto de la telefono, du policianoj, kaj mi.”

Kiam mi estis malgranda, mi kutimis ŝajnigi esti ebria.

Nun, kiam mi revenas hejmen, mi ŝajnas esti sobra.

Ĉiumatene virkoko iras al la kokinejo kaj kisas 9 el 10 kokinoj kaj eltiras plumon de la deka. Estas tiel je la 2a, 3a, 4a ... kaj 9a tagoj. Je la deka tago, la lasta kokino koleras kaj demandas al li, kial li kisas 9 el iliaj amikoj kaj



eltiras plumon sur ŝin ĉiumatene. La virkoko svingas siajn plumojn kaj flustras en ŝian oreilon: "Mi volas vidi vin nuda, karulino."



Bildoj: Pixabay

Purigistino en muzeo lavas la plankon post fermo kiam ŝi subite kolizias kun tablo sur kiu estas florbazo. La florbazo falas de la tablo kaj rompiĝas je pecetoj. Kolera sekurgardisto tuj alvenas kaj krias al la purigistino: "Vi malfeliĉa virino, tiu florbazo estis el la 15-a jarcento!"

La purigistino tenas sian koron kaj suspiras: "Ho ve, mi timis, ke ĝi estas nova!"

Josef Kříž

Somero en urbo – kion fari?

Dum pluva tago – konstruu domojn per "Lego-pecoj". Eble egalaĵo al la populara digitala *Mine-craft* – oni konstruas kaj malkonstruas. Mia najbarino Jane sperte konstruis urbon por siaj nepoj.

Dum pluva tago oni povas elekti la interan banejon kun multe da ludeblecoj. Do, oni povas fariĝi malseka ene en domo aŭ ekstere en lago kaj pluvo.



Ludi minigolfon ĉe Tallhyddan, proksime al la lago Mjörn eblas.

Tallhyddan estas fama pro siaj bongustaj vafloj.

Parkoj abundas en Alingsås. Jen parko kun ŝako. En la lernejo de mia nepo dum unu paŭzo semajne oni lernas ludi ŝakon kaj diversajn triktrakojn (brädspel).

Ĉu vi scias, ke krom lerni lingvojn per Duolingo, oni ankaŭ povas lerni ŝakludon?

Teksto kaj bildoj: Siv Burell



Är esperanto inte ett fullt fungerande språk?

Mikael Parkvall 15/12 2024 i Svenska Dagbladet



Är det brister i det internationella språket som lett till att genomslaget uteblivit?

Många har åtminstone ett vagt begrepp om vad esperanto är. För den som inte har det: Esperanto är ett konstgjort språk, skapat av den polsk-judiske ögonläkaren Ludvig Zamenhof. Uppvuxen i den flerspråkiga (vitryska, ryska, polska, jiddisch) staden Bialystok, fängslades han av tanken på att skapa ett neutralt mellanfolkligt språk, som kunde tillåta folk att mötas på lika villkor utan att ge någon några fördelar.

1887 lanserade Zamenhof språket, som först efteråt skulle komma att kallas för Esperanto. Förutom att vara neutralt, var Esperanto konstruerat för att vara lättlärt, genom att sakna oregelbundna verb, genus och all annan bråte som normalt ställer till elände för inlärare.

Esperanto rönste ganska stor uppmärksamhet. Det var rentav nära att språket utsågs till Nationernas förbunds officiella språk istället för de då allenarådande engelska och franska (Sverige var ett av de länder som röstade emot).

Under mellankrigstiden såg esperanto fortfarande ut att ha relativt goda chanser att bli det språk som alla skulle lära sig utöver sitt modersmål, och använda för internationell kommunikation (även den Konsumföreståndare i Åsele som skulle komma att bli min farfar såg till att skaffa sig en lärobok, även om han nog inte kom mycket längre än så).

Andra världskriget lade dock grunden för en helt ny värld, som tog loven av esperantismens visioner. De flesta diktaturer avskydde idén, eftersom den appellerade till suspekta kosmopoliter, och i den fria världen kom USA att bli dominerande vilket ledde till att relativt få ifrågasatte att engelska blev det förhärskande.

Esperanto lever trots allt fortfarande idag. Ett par hundra tusen människor talar det, och på internet är det rätt livaktigt. När Wikipedia var nytt, var esperantisterna exempelvis tidiga att haka på – i början av 00-talet var esperanto där det fjärde största språket – men har idag halkat ner till 32:a plats.

Det riktigt stora genomslaget har dock uteblivit. En del hävdar att det beror på att esperanto saknar särskilda nyanser och inte är kulturbärande. Men det har givits ut över 25 000 böcker på esperanto, och i princip alla världslitteraturens klassiker finns översatta. Det finns också en omfattande originallitteratur som omfattar poesi, romaner och fackböcker. Därutöver produceras även ett stort antal tidskrifter, och, som sagt, en hel del webbsidor.

Riktigt hur många som har esperanto som modersmål vet ingen, men uppskattningarna brukar röra sig kring något tusental. "Stackars satar", har en vanlig reaktion varit när jag har berättat detta för folk. Men varför det skulle vara mer synd om en som har esperanto som

modersmål än om en som talar svenska, älvdalska eller koreanska har ingen ens försökt förklara för mig.

Esperanto har varit ett praktiskt val i många av dessa familjer där föräldrarna har olika språklig bakgrund; parallellt lär sig barnet förstås omgivningens språk automatiskt, och

inget tyder på något annat än att esperanto fungerar alldeles utmärkt som hemspråk.

Slutsats: Det är en myt.

Man kan vara avogt inställd till esperanto av diverse skäl, men den som hävdar att språket är inherent oförmöget att uttrycka det som övriga språk kan, måste helt enkelt anses ha fel tills motsatsen har bevisats.

Religioj kaj meditadoj, kiuj uzas Esperanton

ekz: Oomoto, Bahaismo, Homaranismo kaj la Kosmologio de Martinus



Oomoto, japania religio, kiu komence de la 20:a jarcento estis persekutata de la japana registaro, sed post la dua mondmilito akceptita.

Oomoto diras: *Unu Dio. Unu mondo. Unu interlingvo!* Oomoto diras ke ĉiuj religioj devenas el la sama fonto. La spertoj de la fondinto Nao Deguchi pri aŭtomata skribo kaj kontakto kun la spirita mondo estas la bazo de la Sanktaj tekstoj.

https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/d/d2/Oomoto_cafeteria_Esperanto

Bahaismo. La bahaiismo estas fondita en Irano dum la 19a jarcento. Oni kredas je unueco inter ĉiuj homoj kaj ĉiuj religioj.



La fondinto estas Bahá'u'lláh (1817–1892) konsiderata kiel la sendito de Dio por nia tempo.

- Centraj Principoj: La Bahaa Kredo emfazas unuecon, pacon kaj toleremon. Ili kredas je la unueco de ĉiuj religioj kaj ke ĉiuj homoj estas kreitaj egalaj.

- **Monda Paco:** Centra aspiro de la Bahaa Kredo estas atingi mondpacon kaj unuecon inter ĉiuj homoj.

- Neniu pastraro: La Bahaa Kredo ne havas pastraron kaj neniujn ritojn en adorado.
- Socia etiko: Granda parto de la bahaaj instruoj fokusiĝas al socia etiko kaj la **forigo de antaŭjuĝo**.
- Tutmonda disvastiĝo: **La Bahaa Kredo estas unu el la plej disvastiĝintaj religioj en la mondo**, kun sekvantoj el ĉiuj kulturoj kaj fonoj.
- Bahaismo estas **monoteisma religio**, kiu aperis en la Proksima Oriento meze de la 19-a jarcento.



Homaranismo

La simbolo por Homaranismo estas verda stelo, same kiel la simbolo por Esperanto. La verda koloro kaj la stela formo estas la samaj, sed **la simbolo de Homaranismo reprezentas dinamikan procezon, kiu komenciĝas de la homoj kaj celas ŝanĝi la fundamenton de la socio kaj komerco**.

Homaranismo estas speco **de religio aŭ humanisma doktrino evoluigita de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof**. Same kiel Esperanto estis celita kiel komuna dua lingvo por ĉiuj, **Homaranismo estis celita kiel komuna religio por ĉiuj**.

<https://www.youtube.com/watch?v=c57tNu9lwc4Zamenhof>

La Kosmologio de Martinus

La dano Martinus (1890–1981) skribis *Livets Bog* (= 7 libroj). Lian tutan skribon (ĉirkaŭ 8 000 paĝoj) oni nomas *La Tria Testamento*.

La Tria Testamento estas destinita por humanecaj kaj sciencemaj homoj, kiuj simpatias kun la ammesaĝoj de religioj, sed kiujn ne povas inspiri iu ajn religio surbaze de



(blinda) kredo aŭ de dogmoj kaj ritoj – ĉu el religia aŭ scienca perspektivo.

La kredo, ke ni vivas multajn vivojn por evoluigi estas centra ĉe Martinus.

Dum sia naŭdekjara vivo, Martinus ankaŭ donis multajn prelegojn, en kiuj li informis pri la kosma mondkoncepto, kiun li priskribis en siaj libroj. Multaj el ĉi tiuj prelegoj estis publikigitaj en formo de artikoloj en *la revuo Kosmos*, kiun eldonas la Martinus-Instituto en Kopenhago.

Martinus vidis sian verkon kiel daŭrigon de la religiaj, kulturaj gravaj evolufazoj de antaŭaj epokoj (nomitaj de Martinus "impulsoj"), el kiuj la plej nova formis la bazon de la tri gravaj mondreligioj: Budhismo, Kristanismo kaj Islamo. Li vidis sian taskon krei pli intelektan bazon por la religia aŭ spirita flanko de la vivo kaj kredis, ke ĉi tiu parto de la realeco, samrapide kun la kontinua evoluo de la homaro, povas komenci esti klarigita kaj komprenata pli science, kaj tion Martinus konsideris fari en sia verko en la formo de tio, kion li nomis "*kosmaj analizoj*".

Dum demando-responda sesio en Jönköping en 1969, Martinus estas demandita: "Ni parolos la saman lingvon en la mondo iam. Kiun lingvon ĝi estos?"

Martinus respondas: "*Esperanto! Ni parolos tion. Ne ĉar mi estas esperantisto, aŭ ke ĝi estas moda, sed fariĝas pli kaj pli necese havi komunan lingvon. Imagu se ni havus komunan lingvon hodiaŭ! Tiam ni estus liberaj de ĉiaj tradukoj.*"

Martinus pri la rolo de Esperanto en la disvastigo de analizoj en artikolo el 1974:

"Mi opinias, ke ni estas iom fruaj kun Esperanto, sed alie ĝi estas bonega. Sed ĝi iam venos, kaj ĝi estas grandioza. Estus agrable se ĝi venus rapide. Sed ĝi estos Esperanto. Kio alia ĝi estos? Ĉu ekzistas aliaj lingvoj, kiuj venis pli antaŭen? Ne ekzistas alia lingvo tiel humana. Oni devas rigardi al la kreinto. Li estis nekredeble humana homo. Oni preskaŭ povas vidi, ke li estis nomumita por fari ĝin."

(El la konsilia kunveno 30/4 1974); citita en Samarbetsstruktur ĉapitro 6 d)

Jam en 1939, Esperanto komencis esti uzata en **la revuo Kosmos**.

En 1965, estis tempo por la Instituto Martinus deklari Esperanton kiel la internacian lingvon de la instituto.

"La decido pri Esperanto estas ankaŭ potenca alvoko al ĉiuj interesitoj lerni la lingvon mem, se eble, kaj tiel pliigi ĝian utilecon por aliaj kaj por novaj interesitoj. Ĝi estas ankaŭ alvoko subteni la klopodojn de aliaj en ĉiu maniero, kaj tiel denove pliigi ĝian utilecon por la celoj de la instituto kaj por la ĝenerala, humana disvastigo de monda kulturo."

(Reproduktita en la Kunlabora Strukturo de la konsilia kunveno de la 5a de majo 1965)

El Interreto de Siv

Demando: Ĉu vi scias pliajn religiojn aŭ filozofiajn sociojn, kiuj uzas Esperanton – krom la esperantaj federacioj kaj kluboj?



TRO

Novelo de **A. Ĉeĥov**, el *Lingvo Internacia* n-ro 2–3–4, 1901.

Termezuristo Gleb Gavríloviĉ Smirnov alveturis al stacio "Gnilúŝki". Ĝis la bieno, kien li estas invitita por limigi, restis ankoraŭ veturi per ĉevaloj verstojn tridek-kvardek.

— Diru, mi petas, kie mi povus trovi poŝtajn ĉevalojn? — sin turnis la termezuristo al la ĝendarmo de la stacio.

— Kiujn? poŝtajn? ... ĉi-tie de cent verstoj bonetan hundon trovi estas neeble, ne solan poŝtĉevalojn ... Kaj vi kien veturas?

— En Dévkinon, la bieno de generalo Ĥóĥotov.

— Kion do? — ekscedis la ĝendarmo. — Iru vi post la stacion, tie en la korto iam estas vilaĝanoj, ili veturigadas vojaĝantojn.

La termezuristo ekĝemis kaj ekpaŝis post la stacidomon. Tie post daŭraj serĉadoj, interparoloj kaj ŝanceliĝoj, li trovis fortegan vilaĝanon, malafablan, plenan je cikatroj kaj vestiĝinta per disŝirita vilaĝana surtuto kaj bastaj ŝuoj.

— Diablo scias, kian veturilon vi havas ! — sulkigis la termezuristo, enmetante sin en la veturilon. — Ne eble estas kompreni, kie ĉe ĝi estas posta, kie antaŭa parto ...

— Kion ĉi-tie komprenadi? Kie la ĉevala vosto, tie la antaŭa parto; kaj kie sidas via moŝto, tie la posta parto estas ...

La ĉevalo estis juna, sed malgrasa, kun piedoj distarigantaj kaj oreloj multmorditaj. Kiam la veturigisto sin levetis kaj ekbatis ĝin per la ŝnura vipo, ĝi sole ekskuis la kapon, kiam li ekinsultis kaj ekvipis ĝin ankoraŭ unu-foje, la veturilo ekkriis kaj ektremis, kiel en febro; post la tria ekbato la veturilo ekbalancis, post la kvara ĝi ekŝoviĝis de la loko.

— Tiamaniere ni veturos la tutan vojon? — demandis la termezuristo, sentante la trean skuon kaj mirante la kapablecon de rusaj veturigistoj kunigi malrapidan, testudan veturon kun animeturnanta skuo.

— Ni ĝisvetu-u-ros ! — trankviligis la veturigisto. — La ĉevalineto estas juna, vigla... Permesu nur al ĝi sin rapidigi, tiam poste ĝin oni ne haltigos ... No-o-o, malbenita! ...

Kiam la veturilo eliris el la stacikorto, estis krepusko. Dekstre de la termezuristo etendiĝis malluma frostiĝinta ebenaĵo, sen fino kaj rando ... Se oni veturus sur ĝi, kredeble oni alveturus al ia diabla posedaĵo. Sur la horizonto, kie ĝi malaperis kaj kunfluigis kun la ĉielo, malrapide finbrulis malvarma aŭtuna ĉielruĝo ... Maldekstre de la vojo en la mallumiĝanta aero sin levis iaj tuberoj, ĉu fojnaj amasoj de la estinta jaro, aŭ vilago. Kio estis antaŭe, la termezuristo ne vidis, ĉar de tiu ĉi flanko la tutan kampon da vido kovris la larĝa malgracia dorso de la veturigisto ... Estis senvente, sed malvarme, froste.

Tamen, kia tie ĉi estas senviva loko! — pensis la termezuristo, penante kovri siajn orelojn per la kolumo de la mantelo. — Nek korto,

nek eĉ stango renkontiĝas. Se oni atakus kaj rabus, neniu eĉ scius, se eĉ el pafilegoj oni pafus ... Kaj la veturigisto estas nefidinda ... Vidu, kia dorsego! Se tia infano de la naturo tuŝos per fingro, eĉ tiam la animo for! Kaj vizaĝego lia besta, suspektinda. — He, kara, — demandis la termezuristo, — kia estas via nomo?

— Mia? Klim.

— Nu, Klim, kiel estas ĉe vi ĉi-tie? Ne estas dangere? Ne malbonfaradas oni?



— Ne, Dio favoras ... Kiu do malbonfaradus? Ĉi tio estas bone, ke oni ne malbonfaradas ... Sed pro okazo ia mi prenis kun mi tri revolverojn, — ekmensogis la termezuristo. — Kun revolvero do, vi scias, ŝercoj estas malagrablaj. De deko da rabistoj estas eble sin defendi ...

Estis mallume. La veturilo subite ekkrakis, ekkriis, ektremis kaj, kvazaŭ kontraŭvole, sin turnis maldekstren.

»Kien do li min ekveturigis?« pensis la termezuristo. »Li veturadis ĉiam rekte kaj subite maldekstren. Kion bonan esperi, li deveturos, fripono, en ian sovagan lokon kaj ... kaj ... Estadas ja okazoj!«

— Aŭskultu vi, — sin turnis li al la veturigisto. — Tiel vi diras, ke tie ĉi estas ne dangere? Tio ĉi estas domaĝe ... Mi amas kunbati kontraŭ rabistoj ... Vidŝajne mi estas malgrasa, malsana, sed la forto en mi, kiel en bovo ... Unufoje ekatakis min tri rabistoj ... Tiam, kion vi opinias? La unuan mi tiel traĥis¹, ke ... ke, vi komprenas, li dedonis al Dio la animon, kaj la du aliaj ekiris Sibirion por punlaboroj... De kie ĉe mi aperas la forto, mi ne scias ... Mi

ekkaptas per unu mano iun sanegulon,
similan al vi, kaj ... kaj faligas.

Klim ekrigardis posten la termezuriston,
ekpalpebrumis per la tuta vizaĝo kaj ekvipis la
ĉevaleton.

— Jes, frateto, daŭrigis la termezuristo. — Ne
lasu Dio iun kun mi havi faron. Ne sole la
rabisto sen la manoj kaj piedoj restos, sed
ankoraŭ antaŭ juĝo respondos ... Kun mi ĉiuj
juĝistoj kaj distriktestroj estas konataj. Mi
estas homo regnaĵa, bezona ... Mi ja veturas,
kaj al la estraro estas sciate ... Ĝi atente
rigardas, por ke iu ne faru malbonon ... Ĉie
laŭlonge de la vojo post arbaretoj urjádnikoj
kaj sótskoj² estas disŝovitaj ... Ha ... hal ...
haltu! — ekkriegis subite la termezuristo. —
Kien do vi estas enveturinta? Kien vi min
veturigas?



— Ĉu vi ne vidas? Arbaro.

»Efektive, arbaro«, ekpensis la termezuristo.
»Kaj mi tiel ektimis! Tamen estas malbezone
elmontri mian maltrankvilecon ... Li jam
rimarkis, ke mi estas malkuraĝa ... Kial li
komencis tiel ofte rerigardadi al mi? Certe li
intencas ion ... Antaŭe li veturis iom-iom,
paŝo post paŝo, kaj nun jen kiel rapidegas!«

— Aŭskultu, Klim, por kio vi pelas tiel la
ĉevalon?

— Mi ĝin ne pelas, ĝi mem estas sin
rapidiginta ... Kiam nur ĝi sin rapidigis, tiam
per nenia maniero ĝin oni povas efiki ... ĝi
mem estas malĝoja, ke ĝi havas tiajn piedojn.

— Mensogas vi, frato! Mi vidas, ke vi
mensogas! Tamen mi ne konsilas al vi tiel

rapide veturigi ... Haltigu iom la ĉevalon ... Ĉu
vi ne aŭdas? Haltigu!

— Pro kio?

— Pro tio ... pro tio, ke post mi de la stacio
devas alveturi kvar kolegoj. Estas bezone, ke
nin atingu. Ili estas promesintaj atingi min en
tiu ĉi arbaro. Kun ili estos gaje veturi. Ili estas
homoj sanegaj, potencaj ... Ĉiu havas po
pafileto ... Pro kio vi ĉiam rerigardadas kaj sin
movadas kvazaŭ vi sidus sur kudriloj? He? Mi,
frato, tion ... frato ... Sur mi rerigardi estas ja
por nenio ... mi ne prezentas ion interesan ...
Ĉu solaj la revolveroj ... Mi estas preta, se vi
volas, ilin mi elprenos, montros ... Volu ...

La termezuristo eksimiligis, ke li serĉas en la
poŝoj, kaj en tiu ĉi tempo okazis tio, kion li ne
povis atendi ... Klim subite sin elfaligis el la
veturilo kaj per la manoj kaj la piedoj ekkuris
al la densejo.

— Helpon! — ekkriis li. — Helpon! Prenu vi,
malbenita, kaj la ĉevalon, kaj la veturilon,
sole ne perdu mian vivon! Helpon!

Estis aŭdataj la rapidaj forirantaj paŝoj, la
krako de vergaĵo — kaj ĉio eksilentis ... La
termezuristo, kiu ne atendis tian rezulton,
unue haltigis la ĉevalon, poste sin sidigis pli
oportune sur la veturilo kaj komencis
pensadi.

»Li forkuris ... ektimis, la malsagulo ... Nu, kiel
nun mi agos? Mem mi daŭrigi la veturon ne
povas, ĉar mi ne scias la vojon, kaj oni povas
opinii, ke mi de li ŝtelis la ĉevalon ...«

— Klim! Klim!

— Klim! — respondis la eĥo.

Pro la penso, ke tutan nokton li devos sidi en
la malluma arbaro en malvarmo kaj aŭdi sole
lupojn, eĥon kaj spirblovojn de la malgrasa
ĉevalino, — tremo ekgratis la termezuriston
laŭlonge la spino, kvazaŭ per malvarma
raspilo.

— Klimêjo! — ekkriis li. — Kolumbeto, kie vi estas, Klimêjo?

Dum horoj ĉirkaŭ du kriadis la termezuristo, kaj sole post tio, kiam li raŭkiĝis kaj prenis al si la penson pri la noktpasigo en la arbaro, malforta venteto alportis al li ies ĝemon.

— Klim! ĉu tio ĉi vi estas, kolumbeto? Veturu ni!

— Vi mor ... mortigos min!

— Sed mi ŝercis, kolumbeto! Punu min la Sinjoro, mi ŝercis! Kiajn revolverojn havas mi? Tion ĉi mi nur mensogis! Faru la komplezon, veturu ni! Mi frostiĝas.

Klim, kredeble, konsiderinte, ke vera rabisto jam longe malaperus kun la ĉevalo kaj la veturilo, eliris el la arbaro kaj sendecide venis al sia vojaĝanto.

— Nu, kion, malsaĝulo, vi ektimis? Mi ... mi ŝercis, kaj vi ektimis ... Sidigu vin!

— Dio kun vi, sinjoro, — murmuris Klim, enmetanta sin en la veturilon. — Se mi estus sciinta, mi eĉ pro cent rubloj ne veturigus. Preskaŭ mortis mi pro la timo.

Klim ekvipis la ĉevaleton. La veturilo ektremis. Klim ekvipis ankoraŭ unufoje, kaj la veturilo ekkliniĝis ... Post la kvara batero, kiam la veturilo ekmovis sin de la loko, la termezuristo kovris la orelojn per la kolumo kaj enreviĝis.

La vojo kaj Klim ne ŝajnis por li danĝeraj.

Tradukis el la lingvo rusa S. Poljanskij.

¹⁾ Traĥ — la imitaĵo al la sono de batero.

²⁾ Malgrandaj policaĵ oficistoj.



↑ Silverstreckad pärlemorfjäril vid Dumme mosse. ↓ 9 strandskator.



Båt vid Vättern.

En julidag i Jönköping

av **Jan Hellström** (minne från 30 juli 2023)

Började med en promenad från parkering nära Jönköpings flygplats mot södra parkeringen vid Dumme mosse. I början låg vegetation och lite hallon och smultron men ingen fågel. Sedan barrskog på höger sida. Då hördes plötsligt både lockande talltita, tofsmes och bofink. Gott om stora saftiga blåbär. Från den södra parkeringen en kort avstickare till en angränsande del av Dumme mosse.

Vid Vätterns strandpromenad en lätt lunch på Café 93, som ligger fint med utsikt över Vättern ända till Visingsö.

Följde sedan strandpromenaden från ett skogsparti vid Rosenlunds bankar till järnvägsstationen. Flanerande personer, ingen trängsel vid badbryggorna, några sportfiskare, 19 betande kanadagäss på gräsytor och en tät grupp av 9 strandskator vid strandbrynet.

Sedan var det bara att sätta sig tillrätta på Västtåg för färd mot Göteborg. Då går alltså utmärkt att åka med Västtrafik från Jönköping i Småland. (Från Facebook.)

Solvo de la rebusoj en paĝo 7: koloro, fragmento, kometo, parodio, piano.